


Etnismo

N-RO 3

INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ

05. 02. 1973

Tiu ĉi numero enhavas informojn
pri jenaj etnaj grupoj:



KIMRIO *fine de 1972*

Estus pretendeme provi resumi sur nia malgranda spaco la komplikan situacion de nia lando hodiaŭ, kaj prezenti ĝin kiel precizan takson. La plej ekvilibra raporto venus el la plumo de simpatia fremdulo loĝanta inter ni, ĉar ni, kiel kimreparolantaj enloĝantoj, foje povas nur malfacile recenzi nian hejmlandon objektivite. Ni estas devigitaj diri kun Karel Čapek, ĉeĥa verkisto kaj filozofo: "Ĉio, kion la mondo donis al mi, venis per viaj manoj ... vi loĝas en mi kiel mi loĝadis en vi."

La kimreparolanta kimro konstatas, ekde la lulilo, ke li estas membro de minoritata grupo en sia propra hejmlando. (Ni estas 650.000 el 2.500.000.) Multaj faktoroj kontribuis al ĉi tiu neenviinda stato, el kiuj ne malgrava estis la influo de eduka sistemo entute anglalingva. Tiu sistemo celis krei senton de honto en la kimra infano aŭdante paroli sian gepatran lingvon kaj certigis ke fine de la lerneja kariero la infano posedis bonegan scion pri la mirindaj venkoj fare de Anglio, dum ĝi restis tute senscia pri la historio, kulturo kaj tradicioj de sia hejmlando. La sola kontakto kun la kimra, ekster la familia hejmo, konsistis el la diservoj, "dimanĉa lernejo" kaj dumsemajnaj renkontiĝoj en la kapelo, kaj pro tio ni devos resti eterne dankemaj al nia prapatroj en la nekonformisma eklezio, sen kiuj la kimra lingvo certe estus mortinta jam antaŭ la komenciĝo de la pasinta jarcento.

Estas nenia dubo ke la plivastigita instruado de la kimra en ĉiuj lernejoj kaj la kreo de multaj lernejoj kaj unuagrada kaj duagrada tute kimralingvaj kontribuis grandskale al la reviviĝo de interesiĝo pri nia lingvo, kiun ni atestis dum la lastaj jaroj. Tamen, nia denaska soifo por scio kaj speciale por altnivela edukado nerekte helpis fosi tombon por nia lingvo. Ĉar la nia estas nur malgranda nacio, ni ne kapablas provizi sufiĉe da laboro por niaj multnombraj diplomitoj kaj instruistoj. Rezulte multaj estas pelataj trans la landlimon en Anglion, kie kelkaj fine edziĝas kaj starigas siajn hejmojn. Estas neordinare se la kimra lingvo postvivas la duan generacion naskitan en ekzilo. Feliĉe, kreskanta nombro da abiturientoj nuntempe elektas teknikan edukon aŭ lernoservon prefere ol konsideri la universitaton aŭ porinstruistan seminarion kiel ian Mekkon kien ĉiu konscienca kimro devus sin turni. Ni povas nur esperi ke la kvalifikitaj teknikistoj estontece povos trovi taŭgan laboron.

Antaŭ iom pli ol 10 jaroj (do, en 1962) "Cymdeithas yr Iaith" (Kimralingva Societo) estis fondita fare de homgrupo el ĉiaj sociaj tavoloj. Tiuj malkontentiĝis pro la malrapida progreso en la praktika efektiviĝo de la proponoj de la raporto Hughes-Parry, kiu rekomendis dulingvan Kimrion, kaj ili decidis pri obstina tuja agado. Ili opiniis ke eĉ "Plaid Cymru" (Kimra Naciista Partio) nesufiĉe vigle kondamnis instituciojn kiel ekz. la ŝtatoficistaron, kiu tiam estis komplete angligita. Iliaj postuloj estis multegaj, sed ili postulis nenion alian krom la agnoskitaj rajtoj de ĉiu alia dulingva lando.

Ili petis dulingvajn vojmontrilojn, dulingvajn formularojn ĉiuspecajn kaj lastatempe apar-

tan radian kaj televidan kanalojn nur en la kimra. Ili elmontris per manifestacioj kaj rekta agado ke ili ne pretas atendi plurajn jarojn aŭ eĉ monatojn por la efektivigo de tiuj postuloj. Malgraŭ severaj kaj kelkfoje pravaj kritikoj pri iliaj metodoj fare de multaj aliaj kimroj, ili elmontris kaj daŭre elmontras pretecon fronti tribunalojn (kondiĉe ke la proceso estas nur kimralingva) kaj pasigi tempon en malliberejo kaj eĉ suferi postan senlaborecon en la lukto por tio kion ili konsideras esti niaj rajtoj kiel kimralingvaj civitanoj en la propra lando.

La Kimralingva Societo aktive kontraŭas la aĉeton, je nekredeble altaj prezoj, de kimraj dometoj por ferioj kaj semajnfinoj de anglaj familioj, el kiuj la plimulto neniel deziras lerni nian lingvon kaj malmulte respektas nian vivmanieron. Feliĉe ekzistas pluraj laŭdindaj esceptoj.

Estus erare supozi ke ĉiu kimra naciisto kaj ĉiuj membroj de la Kimralingva Societo kontraŭas la anglojn kaj ĉion kion tiuj reprezentas. Ni deziras nur ke ĉiu novalveninto en nia lando - dum li konservas sian specialan individuecon - estu preta partopreni iugrade en nia kulturo prefere ol trudi sian lingvon kaj siajn morojn al ni kvazaŭ per dia rajto. Ni komprenas, tamen, ke la gardado de nia lingvo kaj de ĉio kimra fine kuŝas en niaj manoj kaj pli precize en niaj hejmoj. Vojmontriloj dulingvaj ĉie (ĵus atingita sukceso) kaj dulingvaj formularoj nenion valoras, se niaj infanoj kaj genepoj elektas ludi, legi kaj adori dion en la angla.

Spite al ĉiuj klopodoj kontraŭaj, ĉe granda proporcio el nia popolo ekzistas kredo ke ĉio angla estas iel supera, ĉu temas pri edukado, distraĵoj aŭ eĉ produktoj. Ĝis kiam tiu sinteno estos iom ŝanĝita, ni restos dividita socio, kaj neniam efektiviĝos la revo naciista pri Kimrio kiu, estante sendependa memrespektema klera nacio, povos preni sian ĝustan lokon apud ĉiuj aliaj malgrandaj nacioj de la mondo. En sia romano "Wythnos yng Nghymru Fydd" (Semajno en estonta Kimrio) Islwyn Ffowe Elis prezentas al ni du absolute kontrastajn portretojn pri la ebla estonta Kimrio: okcidenta Anglio aŭ Kimrio, nacio memrajta. La elekto estas grandparte la nia!

BARBARA DAVIES

(Tiu ĉi artikolo estas tradukita de Hilary Chapman, Bangor.)

PLIAJ INFORMOJ PRI KIMRIO

Laŭ la oficiala statistikaro de la Kimra Oficejo, n-ro 18/1971, la enloĝantaro de Kimrio nombris en 1971 2.725.000 personojn, el kiuj 656.000 scipovis la kimran lingvon kaj 26.200 homoj ne regis la anglan lingvon.

Dum aŭgusto 1972 la registara enketkomisiono sub Roderic Bowen prezentis sian raporton pri dulingvaj trafiksignoj. La komisiono rekomendas la dulingvigon de ĉiuj teksttabuloj (escepte de sameco de nomoj en la kimra kaj angla). La ŝanĝoj estu efektivitaj dum 10 jaroj kaj kostos pli ol 3 milionojn da pundoj.

" F E S T A D È L P I E M O N T "

La "Festa dël Piemont" (Festo de Piemonto) naskiĝis en 1968. En julio de tiu jaro aperis en la najbaraĵoj de Biella kaj Graglia afiŝoj iniciatitaj de la "brandé" (itale: alari, Esperante: fajrostangoj) de Biella, kiuj anoncis la feston, kaj sur la domoj ekaperis ankaŭ la antikva standardo de Piemonto: blanka kruco sur ruĝa fono, kun tri lazuraj gutoj en la supra parto, preskaŭ 550 jarojn malnova simbolo. La "brandé" estas la piemontlingvaj poetoj kaj verkistoj, kiuj intencas daŭrigi la agadon de Pinin Pacòt (1899 - 1964), kiu celis diskonigi la literaturan heredaĵon kaj regionan kulturon de Piemonto por konfirmi ilian valoron kaj savi la piemontan lingvon de la niveligo praktikata en la lernejoj.

Tiel, dimanĉon, la 21-an de julio 1968, celebriĝis en la Sanktejo de Graglia la unua Festo de Piemonto. Oni elektis tiun daton por ideo ligi sin al la rememorigo de la batalo de Assietta (19-a de julio 1747), en kiu kelkaj miloj da piemontantoj, kun la helpo de imperiestraj fortoj kaj valdanaj (*) popolmilicanoj, venkis kontraŭ la invadantaj francoj. Sendube tio estis ne nur grava periodo en la aŭstra heredmilito, sed la rezisto kaj venko de la piemontantoj signifis ankaŭ la savon de la propra sendependeco. Interpretante la pacemajn aspirojn de la piemontanoj, la "brandé" ne intencis atribui al la Festo la taskon de nura rememorigo de glora militentrepreno, sed proponis ligi la Feston al menciita batalo por reliefigi la unuecon de la piemonta popolo, tiel en tempoj pacaj kiel en tempoj militaj.

En 1969 la Festo de Piemonto okazis en la Sanktejo San Giovanni d' Adorno, kaj en 1970 en la Sanktejo de Oropa. En 1971 la Festo forlasis la ĉirkaŭeĵojn de Biella kaj estis organizita en Perosa Argentina (Valo Chisone), dum en 1972 estis vico de la urbo Mondovì gastigi la piemontanojn dum tuta semajno, kiu finiĝis la 16-an de julio.

Ĉeestis la pasintjaran Feston ĉirkaŭ 300 argentinaj piemontanoj, membroj de la "Famija Piemonteisa" de Córdoba. En Argentino tiuj piemontanoj disponas radiostacion, kiu disaŭdigas piemontlingvajn programojn dum kvar horoj ĉiusemajne. Multaj posteuloj de piemontanoj, enmigrintaj en Argentinon dum la pasinta jarcento, eĉ ne scipovas la italan, sed nur la piemontan, la lingvon de la gepatroj, kiun ili ĉiam aŭdis en la nova domo kaj kiu estis la nura ligilo kun la malnova patrolando Italio. La "Famija Piemonteisa", kiu simbolas la preskaŭ tri milionojn da piemontanoj loĝantaj en Argentino, ekhavis la ideon krei mondan federacion de piemontaj asocioj, laŭ la modelo de simila friula organizo.

La konsciigo flanke de la eksterlande loĝantaj piemontanoj kaj la instituciigo de la "regionoj" en Italio substrekas la ĝustecon de la defendo de la propra lingvo, ne kiel simbolo de kontraŭ-unuiga kamparanismo, sed kiel agnosko de pasinteco kun granda valoro por la historio de Italio kaj Eŭropo.

(*) VALDANO: adepto de kristana sekto fondita en la 12-a jarcento de la liona komercisto Pietro Valdo kaj aliĝinta en la 16-a jc. al la protestanta reformo.

en tiu ĉi kadro estas tre grava la reeldono de "Aesopus moralisatus", verko publikigita de la presejo Vivaldi, Mondovì, en la jaro 1476. Same gravaj estas la nomigo de strato laŭ la fratoj Baretto kaj la ĉi-feste esprimita neceso defendi ankaŭ la tipe piemontajn pejzaĝojn kaj konstruaĵojn atakatajn de polucio kaj betonigo. Jen do la signifo de la Festo de Piemonto: projekti la piemontan regionon en la kadro de la estonteco de Italio, samtempe defendante la propran pasintecon kiun oni ja tro ofte konsideras nur turisma folklorajo anstataŭ aljuĝi al ĝi grandan historian valoron.

(Tiu ĉi skizo estas redaktita de Wim Jansen helpe de du artikoloj aperintaj en "La Stampa" de 13. 07. kaj 18. 07. 72.)

SEMINARIOKURSOKOLOKVOSEMINARIOKURSOKOLOKVOSEMINARIOKURSOKOLO

INTERNACIA KOLOKVO DE LA KATALUNAJ LINGVO KAJ LITERATURO

De la 9-a ĝis la 14-a de aprilo 1973 okazos en Fitzwilliam College, Cambridge, Grandbritio, la 3-a internacia kolokvo de la katalunaj lingvo kaj literaturo kun amaso da intereseĝaj kontribuoj el diversaj landoj.

Adreso: Dr. Geoffrey J. Walker, Fitzwilliam College, Cambridge CB 3 0 DG, Grandbritio. Tiun kolokvon aranĝas la Internacia Asocio de la katalunaj lingvo kaj literaturo (F. M. Lorda i Alaiz, Drakenstein 39, Landsmeer, Nederlando).

SEMINARIO DE JUNAJ MINORITATISTOJ

La Junulara Komisiono de la Federalisma Unio de Eŭropaj Etnaj Minoritatoj (JK/FUEEM) invitas al la

PASKA SEMINARIO

de la 13-a ĝis la 18-a de aprilo 1973 en la kursejo de la sudŝlesvigaj junularaj asocioj "Christianslyst", Nottfeld, D-2347 Süderbarup (FRG). Petu detalajn informojn ĉe:

s-ro Olav Meinhardt, sekretario de JK/FUEEM,
Jacobysalle 13, DK - 1806 København V.

ENKONDUKO EN LA ROMANĈAN LINGVON

La "Fundaziun Planta", Chesa Planta, CH - 7503 Samedan, Svisio, organizas dusemajnan enkondukan kurson de la 16-a ĝis 27-a de julio 1973 en Samedan. La programo antaŭvidas antaŭtagmezajn lecionojn kaj posttagmezajn lumbildprelegojn kaj ekskursojn. Pro detaloj kaj aliĝiloj turnu vin al la supre menciita adreso. La laborlingvoj estas la romanĉa kaj germana.

Pri OKCITANIO

L. PELLETIER

La vorton OKCITANIO oni ne trovas en multaj vortaroj, kvankam ĝi estis, en 1271, kreita de la franca administracio post konkero de la teritorioj de l' grafo de Tuluzo. (La elemento "oc" en la franca termino "langue d' oc" devenas el la latina "hoc" sudfrancie uzita por diri "jes" kontraŭe al la nordfrancia "hoc ille" iĝinta "oïl" kaj poste "oui".) Okcitanio ampleksas la iamajn provincojn Gaskonio, Gujeno, Langvedoko, Aŭvernjo, Limoĝio, Provenco kaj Daŭfenio (parte). Oni parolas okcitanajn dialektojn ankaŭ trans la limoj de la Franca Respubliko: la gaskonan en la Pireneoj (valo de Arán, provinco de Lerido) kaj la provencan en la Alpoj (Kuneo, Italio).

La okcitana lingvo estis administracia kaj kultura lingvo (la ĉefaj trobadoroj uzis ĝin). Kiam Dante ekskribis la Dian Komedion, li hezitis inter la okcitana kaj la itala lingvoj. Post la franca invado al Okcitanio la lingvo disdialektiĝis, kaj la verkistoj ne plu serĉis la puran lingvon de la trobadoroj, sed kaose skribis en sia loka lingvaĵo. Oni kalkulis pli ol 50 dialektojn kun la plej strangaj skribformoj.

Tio daŭris ĝis la duobla renaskiĝo de la okcitana lingvo: En Provenco poetoj grupiĝintaj ĉirkaŭ Mistral adoptis ortografion, kiu, tamen, izolas la provencan dialekton ne nur de la malnova klasika lingvo kaj de la aliaj okcitanaj dialektoj, sed ankaŭ de la aliaj modernaj latinidaj lingvoj. Sed okcidente de Rodano du poetoj - Perbosc kaj Estieu -, reprenante la verkojn de la trobadoroj kaj batalante kontraŭ partikularismojn, prezentis ortografion kiu ebligas al ĉiu skribi en sia idiomo kaj legi la tekstojn de la tuta Okcitanio kaj de ĉiuj epokoj. En 1935 la sistemo estis perfektigita de Alibert, kiu verkis plenan gramatikon, eldonitan de la "Generalitat de Catalunya". Poste fondiĝis en Tuluzo la Instituto de Okcitanaj Studoj (Institut d' Estudis Occitans), inter kies celoj estas la purigo de la dialektoj, kio eble kondukos al unueca lingvo. Dume, multaj junaj verkistoj elektis kiel literaturan lingvon la plej centran dialekton de meza Okcitanio. Tiu "interlingvo", tre facile komprenata de ĉiu inteligenta okcitano, ebligas eldoni grandkvante la plej diversajn librojn kaj la diskojn de la modernaj trobadoroj kantantaj akompane de gitaro. Aktuale proksimume 12 milionoj da enloĝantoj parolas la okcitanajn dialektojn.

En la okcitanista movado troviĝas pluraj organizoj kun plej diversaj tendencoj: "Partit Nacionalista Occitan" kiu celas sendependan ŝtaton kun ĉiuj kutimaj karakterizaĵoj; aliaj organizoj strebas al tri grandaj okcitanaj regionoj kiuj ludu sian rolon en la esperata morgaŭa socialista Eŭropo; ekzistas eĉ Socialista Okcitana Partio kaj Okcitana Liberecana Komunista Partio. Nuntempe ĉiuj batalas kontraŭ la plagoj far de la centraligita ŝtato, ĉar kiel la registaro de Francisco Franco y Bahamonde, ankaŭ la Franca Respubliko celas malaperigi ĉiujn etnajn kulturojn. Do, por okcitanoj, por bretonoj, por vaskoj, por katalunoj, por korsikanoj, por flandroj, por alzacanoj la batalo estas la sama.

(La ĉi-supra artikolo estas diversloke modifita de la redakcio.)

PLURLINGVECO

EN

LUKSEMBURGIO

Ĉar, parolante pri Luksemburgio, mi neniam certis kiom da lingvoj oni tie uzadas, la 9-an de oktobro 1969 mi skribis al la koncernata ambasado en Bonno. Ne ricevinte respondon, la 10-an de novembro 1972 mi reskribis kaj tre baldaŭ havis afablan reagon, interalie multobligitan tripaĝaĵon germanlingvan (sub franclingva leterkapo). Laŭ la vic-konsula rekomendo mi turnis min tuj al "Institut Grand-Ducal, Section de linguistique, de folklore et de toponymie" (5, rue Large, Luksemburgo). Jen miaj demandoj kaj la respondoj de s-ro Heng Rinnen, ambaŭ tradukitaj el la germana. (La respondoj estas iomete mallongigitaj.)

1. Ĉu ĝustas ke via ŝtato havas la tri oficialajn nomojn "Grand-Duché de Luxembourg", "Großherzogtum Luxemburg" kaj "Grousherzogdem Lezebuurg" [kion mi trovis en "Fischer-Weltalmanach '73"]?

RESPONDO: Ne. La oficiala nomo de la ŝtato estas "Grand-Duché de Luxembourg". Oficialaj skribaĵoj, komunikoj havas tiun ĉi titolon. Ĉar la franca kaj la germana estas la oficialaj lingvoj de la administracio, jen kaj jen en dulingvaj komunikoj super la germanlingva teksto troviĝas la nomo "Grossherzogtum Luxemburg". Ne ekzistas kaj neniam ekzistis oficiala luksemburga nomo "Grousherzogdem Lëtzebuerg". En la ĉiutaga parolado la luksemburgiano nomas sian hejmlandon "D' Lëtzebuurger Land" [La luksemburga lando].

2. Ĉu ekzistas gramatiko/lernolibro de la luksemburga?

RESPONDO: Lernolibro - por studi la luksemburgan (ekzemple por eksterlandanoj) - ne ekzistas. Ja ekzistas "gramatiko" de la luksemburga verkita en la franca kaj germana. [Vidu malsupre.]

3. Ĉu aperas iaj gazetoj aŭ revuoj komplete aŭ parte en la luksemburga?

RESPONDO: Jen kaj jen aperas, en luksemburgiaj taggazetoj, sed malofte en revuoj, tekstoj en la luksemburga. Tute en la luksemburga estas la revuo "Eis Sprooch" [t. e. Nia Lingvo].

4. Ĉu ekzistas institucioj kiuj esploras science kaj vartas la luksemburgan?

RESPONDO: La sciencan esploron prizorgas la instituto menciita, kiu publikigas unuopajn studojn kaj de post 1950, en ĝis nun 20 partoj, la "Luxemburger Wörterbuch" (luksemburga vortaro). Al la vartado de la luksemburga dediĉas sin plene la revuo "Eis Sprooch".

5. Ĉu ekzistas lerneja instruado en la fako "luksemburga lingvo" kaj/aŭ instruado en alia fako en la luksemburga?

RESPONDO: En la luksemburgiaj elementaj lernejoj kaj parto de la duagrada lernejoj ja ekzistas lecionoj pri la luksemburga kaj la tiulingva literaturo, tamen ne kiel memstara fako, sed en la kadro de "nacia historio" respektive germana lingvo. Ekzistas ankaŭ porjunularaj verkoj en la luksemburga, kiujn oni trovas ankaŭ en lernejoj bibliotekoj.

6. Ĉu ekzistas oficialaj tekstoj (parlamentaj raportoj, leĝoj) en la luksemburga?

RESPONDO: Ne ekzistas oficialaj tekstoj en la luksemburga. Oni presas du parlamentajn raportojn: detalan en la franca, resuman en la germana senkoste distribuitan al ĉiuj familioj. En la parlamento la deputitoj kaj registaranoj parolas france aŭ luksemburge, sed la paroladoj aperas nur en la franca respektive germana.

7. Ĉu ie estas konstateblaj (kultur-)politikaj tendencoj celantaj la iom-post-ioman starigon de la luksemburga lingvo kiel unua aŭ eĉ sola lingvo de la grandduklando?

RESPONDO: Tiaj tendencoj ne ekzistas.

Estas interese noti - surbaze de la vickonsula letero kaj de la ŝtatoficiala informilo - ke la germanan la infanoj eklernas en la unua kaj la francan en la dua elementlerneja jaro. En la gimnazioj oni faras la lecionojn pri matematiko, natursciencoj, politika instruado en la franca. Advokatoj pledas en la franca. La ŝtato ne havas propran universitaton. Multaj elementlernejaj instruantoj kaj estontaj kuracistoj studas en germanaj, juristoj kaj gimnaziaj instruantoj en francaj universitatoj.

BIBLIOGRAFIAJ NOTOJ

1. BRUCH, Robert: Précis populaire de la grammaire luxembourgeoise/Luxemburger Grammatik in volkstümlichem Abriss (kajero 12/14 de "Bulletin linguistique et ethnologique"), Luksemburgo, 1968, 176 paĝoj (inkluzive 16 kvaronpaĝajn lingvajn mapetojn); tiu ĉi 2-a eldono estas akirebla per ĝiro de 100.-- luksemburgiaj frankoj al la poŝtĝir-konto 8776 (por la supre menciita instituto).
2. "EIS SPROOCH", eldonata de ACTIOUN LËTZEBUERGESCH", redaktata de Heng Rinnen (Bësch-Strooss 32, Lëtzebuerg-Zéisseng, Luksemburgio); n-ro 1 de 1972 ampleksas 40 paĝojn preskaŭ A-4-formatajn kun precipe prilingva enhavo: prezento de la revuo, prezento de la asocio "Actioun Lëtzebuergesch", detalega raporto pri parlamenta batalo de 1896 rilate la uzadon de la luksemburga lingvo, poemoj, raportoj pri kunsidoj, asocia statuto, resumo pri la luksemburga ortografio.

K R I T I K O ? !

Kvankam ja venis kelkaj - malmultaj - aplaŭdoj pri la unuaj du numeroj de ETNISMO, tamen la eĥo estas ankoraŭ (?) mizera, --- se oni atendas amasan reagon. Kvankam tiu ĉi bulteneto tute ne grandakvante eliras kaj kvankam ĝi celas nur malgrandan specifan grupon da personoj, iom da diskutado utilis. Jen ni publicas - ekstrakte kaj resume - la leteron de s-ro Owe B. Fahlke, Suttnerstr. 11, D - 1 Berlin 42, FRG, kune kun nia respondeto.

S-ro Fahlke avertas kontraŭ la blinda entuziasmiĝo pri la malgrandaj etnoj: Ne ekzistas LA malbonaj francoj, hispanoj ktp. kaj LA bonaj vaskoj, katalunoj ktp. Ĉar tro ofte la nunaj minoritatoj pruvis/-as ke ili mem subpremas aliajn etnojn kiuj estas - ni diru - duaŝtupaj minoritatoj. La leterskribinto kondamnas la terorismojn de la minoritatoj.

Prave. Necesas atenti ke hodiaŭaj subprematoj ne transformiĝu en morgaŭajn subpremantojn. La teroraĵoj de la minoritataj batalantoj estas akcepteblaj nur kondiĉe ke la aliaj - politikaj - rimedoj estis vane aplikitaj kiel ekzemple en Hispanio kaj Francio!

S-ro Fahlke opinias ke la historio montras plurajn ekzemplojn de formortado de "malgrandaj" lingvoj pro anemio kaj tute ne pro diskriminacio, ekz. la prusa, la romanĉa, la liva, la kornvala kaj aliaj. Li admonas ke "ni fine komprenu la leĝon de la naturo, ke daŭre entoj absorbiĝas, transformiĝas en superecajn unuojn."

NE TEMAS ĈI TIE PRI KOMPRENO! Ekzakte, ni ne povas kaj ne volas klini nin antaŭ tiu kontraŭhoma ideo (tiel ofte realigita en la historio) ke la plejfortulo subigas la malplifortulojn; ne eblas akcepti la asimiladon de perfortitoj. Okupi ies vivregionon, malpermesi paroli kaj skribi la originan lingvon de tiu regiono, punegadi kontraŭagantojn kaj poste konstati anemion, jen la krimo ne nur kultura, sed politika, ĝenerale homa.

S-ro Fahlke vidas la bezonon de ĉu unu ĉu pluraj superlingvoj kaj demandas pro kio konservi restlingvojn.

Konsentite ke la mondo bezonas, por la ĉirkaŭtergloba interrilatado pli simplan sistemon ol la aktualajn kompaniojn aŭ batalionojn da tradukistoj. Tamen, se temas nur pri la plisimpligo de interkompreniĝo, estas multege pli komforte propagandi la anglan aŭ la rusan lingvon ol peneg konstrui universalan lingvon. Sed ja temas pri io plia: konservi la multkolorcon de la homa esprimado en la formo de tiuj 2.000 aŭ 3.000 lingvoj kaj la iliavoĉaj kulturoj.

S-ro Fahlke demandas kie estas la minoritatista junularo; li vidas nur grizbarbulojn kaj eĉ tiujn ne en la grandaj urboj.

Misinformiteco. En la diversaj minoritatismaj movadoj ja aktivis multaj gejunu-

loj, ekz. en la vaska E.T.A. kaj en la friula movado. Inter la parolantoj de la Internacia Lingvo precipe gejunuloj - aŭ ne-jam-grizbarbuloj - okupas sin intensege pri la problemoj de etnaj minoritatoj, kaj la maljunuloj abstinadas, ĉar - ĉiuj konas tiun diskon! - tiu afero odoras je politiko maloportuna por "tutmonda interkompreniĝo"! (Cetere, la aserto de s-ro Fahlke pri la laciĝo de la katalunisma movado dum la unua triono de tiu ĉi jarcento estas 100-procente malĝusta: Neniam Katalunio konis tian ampleksiĝon de la lingvouzado, en ĉiuj medioj, de la kataluna kiel dum ekzakte la unuaj 40 jaroj de la 20-a jarcento!!!)

S-ro Fahlke miras pri la silentado de ETNISMO koncerne la situacion de la etnaj minoritatoj en Sovetunio, kie - laŭ la leterverkinto - regas la rusa kulturimperismo.

Ni havas la saman bedaŭron kiel nia kritikanto: Mankegas al ni konkretaj kaj dokumentitaj informoj pri la situacio en Sovetunio kaj en kelkaj aliaj socialismaj ŝtatoj. Tamen, ni estas survoje al dokumentado pri Estonio, GDR, Rumanio kaj Jugoslavio.

KAJ KION OPINIAS (VI)?

KUNVIVA

DD OO
DD OO

INTER LA ETNAJ MINORITATOJ KAJ LA ŜTATOJ ---

jen la temo de unu el la diskutgrupoj kunsidontaj dum la Paska Kultura Semajno de Junulara Esperantista Franca Organizo.

DATOJ: 11 - 17 / 04 / 1973 ←

LOKO: Kastelo Grésillon, Francio ←

INFORMAS: JEFO, 34, rue de Chabrol, F - 75 PARIS 10

"Stichting voor internationale kommunikatie", Amsterdamo, eldonis:

SEMINARIO "LINGVO KAJ POLITIKO"

A-4-formata, pli ol 100 paĝoj, ng 3,50 (+ 1,75 afranko),

kun prelegoj, referaĵoj, diskutoj kaj bibliografiaj indikoj de la Pariza seminario aranĝita de TEJO/KER de la 10-a ĝis 16-a de julio 1972. La dokumentaro estas mendebla en Esperanto, la angla, franca kaj nederlanda ĉe: "Stichting ...", Kastelenstraat 231, Amsterdam Z, Nederlando.

INTERPELACIO DE SENATORO WIM JORISSEN PRI LA SITUACIO DE LA GERMANLINGVAJ BELGOJ

La 30-an de majo 1972 senatoro Wim Jorissen, membro de la flandrismo partio "Volksunie" (t. e. "Popolunio"), direktis al la ĉefministro de Belgio interpelacion, en kiu li riproĉas al la registaro aron da kontraŭleĝaĵoj. Jen resume la enhavo:

En Belgio vivas pli ol 100.000 personoj germanlingvaj. Temas, unue, pri tiuj kiuj de 18 apartenas al la reĝlando Belgio (komunumoj kiel Montzen, Gemmenich, Moresnet en la nordorienta parto de la provinco de Lieĝo, kaj la limregiono apud la grandduklando Luksemburgio). Temas, due, pri tiuj pli ol 60 mil germanlingvuloj el la kantoj Eupen, Sankt Vith kaj Malmédy aligitaj al Belgio nur en 1918. La interpelacio traktas nur tiun duan grupon.

La unua problemoj estas tiu de la ŝtatoficistoj, kiuj laŭ la leĝoj jam delonge validas devas disponi pri atestitaj germanlingvaj konoj. Tamen, en la kantoj Eupen kaj Sankt Vith estas dungitaj 592 oficistoj surbaze de franclingva ekzameno, nur 316 surbaze de germana, 4 surbaze de nederlanda kaj 43 sen lingvo-ekzameno (ĉi-lastan grupon Jorissen suspektas franclingva). La nesufiĉeco de germanlingvaj ŝtatoficistoj kaŭzas duoblan malhelpon: Unue, postenoj okupeblaj de germanlingvuloj estas jam okupitaj de alilingvuloj; due, la prestiĝo de la germana lingvo malgrandiĝas, se la ĝenerale prestiĝaj ŝtatoficistoj plej ofte parolas alian lingvon en precipe germanlingva regiono.

La dua problemoj estas tiu de la edukado. Ne ekzistas germanlingva instruado sur universitata nivelo. Kvankam ne valorus fondi germanlingvan altlernejon, tamen oni devas agnoski la diplomojn de belgoj akiritaj en germanlingva eksterlando por dungigi ilin en Belgio. - En la mezgrada instruado 4 instruistoj estas nederlandlingvaj, 99 estas franclingvaj kaj 178 germanlingvaj. Tio, laŭ Jorissen, estas komplete kontraŭleĝa.

La tria problemoj estas la ne-jam-efektivigo de germana kultura konsilantaro. La reprezentivaj konsilantaroj valona kaj flandra estas formitaj el la parlamentanoj, sed en la du ĉambroj de la parlamento ne troviĝas germanlingvuloj! Do, necesas trovi aliajn solvon.

La kvara problemoj estas tiu de la politika reprezentado sur la niveloj de ŝtato kaj provinco: La germanlingvuloj estas minoritato en la franclingva provinco, kaj la valoraj partioj ne lasas alpintiĝi, en la kandidatolistoj, nur-germanlingvulojn. Se la enloĝantoj de Eupen, Sankt Vith ktp. volus sendi siajn proprajn deputitojn en la parlamentojn, ol 50 % devus voĉdoni por unu sola homo - sur aparta listo! - ironta en la bruselan konstituantajn putitejon, kaj bezonatus la voĉoj de ĈIUJ enloĝantoj por elekti unu senatoron! Jorissen opinias ke fondo de aparta germanlingva provinco (kiu aŭtomate disponus pri senatoroj) estus la adekvata solvo.

La kvina problemoj estas historikaŭzita: La kantoj estis jen belgiaj, jen germanaj kaj ankaŭ post la dua mondmilito la venkintoj malfavoradis la venkitojn, inter kiuj es

multaj enloĝantoj de la t. n. orientaj kantonoj antaŭe glutitaj de la naziaj neniamsatuloj. Jorissen postulas la finon de tiu postmilita punperiodo.

La sesa problemo estas tiu de germanlingvaj procesoj en certaj tribunaloj. Diversaj leĝoj kaj ediktoj bezonas adapton al la nova ordo de lingvoj en Belgio. Ankaŭ mankas germanlingvaj leĝotekstoj.

(Ni esperas ke eblos publikigi pliajn materialojn pri la situacio de la germanlingvaj belgoj en la sekvanta numero de ETNISMO.)

PREPARANTE EKSPOZICION

oni ja spertas diversajn strangaĵojn. La ambasadoj de Francio, Grandbritio, Hispanio kaj Italio en Bonno tre simile neglektas la informadon pri etnaj minoritatoj en la respektivaj ŝtatoj. Petite sendi plej diversajn materialojn (mapojn, dokumentojn, statistikojn, deklarojn de la registaro kaj de partioj kaj tekstojn en la minoritataj lingvoj) por ekspozicio en la porknaba gimnazio de Eschweiler (proksime de Akeno), la kultura konsilisto de la franca ambasado afable respondis sendante fotokopiojn de "Le Monde"-artikoloj el pasintaj jaroj kaj komunikante adreson en Parizo kie - laŭdire - haveblas pliaj materialoj. Kiam la informpetinto insistis pri uzeblaj materialoj kaj skribis interalie ke "li ne aŭdacas imagi ke la franca registaro tiel malmulte okupiĝas pri la prezento de grava kampo de la kulturo de la franca ŝtato", la reago de la ambasado estis surprizega: Oni turnis sin al la direktoro de la gimnazio, en kiu deĵoras la insistanto, kaj proponis ke la lernejestro - surbaze de aldonitaj fotokopioj de la korespondaĵoj!!! - formu al si opinion. La direktoro miris pri tiuj paŝoj de la ambasado kaj respondis ke la informpetinto ne celis ofendi la ambasadon. --- La itala ambasado sendis fotokopion de unu sola artikolo pri la slovenoj en Italio kaj ... adreson en Romo. --- La brita ambasado transdonis la peton al la biblioteko de "British Council" en Kolonjo, de kie venis librolistoj pri ne-eŭropanoj vivantaj en Grandbritio. Kvankam tiuj grupoj ja estas etnaj minoritatoj en Grandbritio, estas tre mirige ke la kompetentuloj tutsimple malatentis la eksplicitan peton pri materialoj koncerne Kimrion, Skotlandon, la Mank-san Insulon kaj la Normandajn Insulojn. Iom klara insistito rezultigis prunesendon de kelkaj libroj pri la situacio de Kimrio kaj (ĉu amuzocele?) pri la irlandgaela kaj pri la aĝo-, profesi- ktp. konsisto de la enloĝantaro de Guernsey (sen kiu ajn indiko pri la etna konsisto aŭ pri la lingvo). --- La hispana ambasado prunesendis simile stultan statistikon pri Hispanio kaj instruis la petinton ke en Hispanio ne temas pri etnaj minoritatoj kiel ekzemple en Ĉeĥoslovakio kaj Turkio, sed ke la unueco de Hispanio estas atingita sub la Katolikaj Reĝoj (15-a jarcento) kaj ke la diversaj provincoj ankoraŭ nun konservas siajn tipan karakteron (fakte, eĉ faŝismo ne sukcesis ŝanĝi la montarojn), justicon (rekta MENSOGO !) kaj lingvon (duona mensogo: ĉar pluraj provincoj perdis sian originan lingvon pro la blinda centrismo de Madrido kaj aliaj regionoj lukt egadas kontraŭ la moderna monotonigo). Insisto venigis almenaŭ lernolibron pri hispana historio kaj geografio kun etaj mencioj pri la lingvoj, krome varbilojn pri Hispanio.

Ni, tre bedaŭrinde, trovis nian ĝisnunan sperton konfirmita rilate la ambasadon de la Socialistaj Sovetaj Respublikoj: NENIU REAGO. Tamen, eĉ la nederlanda ambasado ne respondis. Same ne helpemas la komerca agentejo de Hungario.

Tre bone subtenis la kolektadon la ambasadoj de Irlando, Suomio, Svedio, Norvegio, Svislando, Rumanio, Jugoslavio kaj Danlando, la FRG-ambasado en Malto, la FRG-konsulejo en Marsejo (kompetenta pri Andoro) kaj esperantistoj en Kimrio, Irlando kaj Estonio.



Certe, ambasado havas multegajn aferojn por solvi. Sed se informpetoj pri la koncernata lando kaj por serioza celo restas netraktitaj aŭ estas evidente neglektege traktataj, kiel en la menciitaj kazoj, kaj se temas pri aferoj ne tre bone aranĝitaj en tiuj ŝtatoj, oni ne povas ne pensi ke la koncernataj registaroj, ankaŭ en sia informado, rekte subpremas tiujn etnajn minoritatojn.

Do, ĉu ne evidentas ke tia ekspozicio estas urĝe bezonata por konsciigi la homojn, eĉ nur malgrandan grupon, pri la vera sinteno de la "grandaj" popoloj?

Se vi disponas pri konvenaj materialoj (ekz. afiŝoj, minoritataj revuoj, gazetoj, diskoj, partiprogramoj, mapoj ktp.) aŭ se vi povas aĉeti tiajn, bonvolu tuj kontakti la eldonanton de ETNISMO informante lin pri prezoj ktp.

D a n k o n.

+++++

ETNISMO

dankas al pluraj subtenantoj, kiuj kaj finance kaj enhave helpas nutri tiun ĉi eksperimentan eldonaĵon. ETNISMO ne estas revuo aŭ gazeto, evidente. Ĝi estas bulteneto, kiu peradu dokumentojn, opiniojn, informojn inter interesitoj pri etnaj minoritatoj. Eventuale ETNISMO ricevos iom post iom pli seriozan aspekton, sed momente ĝi jam glutas tro da mono: Tiu ĉi numero (120 ekzempleroj) kostas, inkluzive paperon, stencilojn, kovertojn kaj afrankon, GM 60,-. Do, ĉia subteno estas tre bonvena.

Jen la ĝisnunaj subtenantoj:

Wim Jansen - Tazio Carlevaro - Louis Pelletier - Serge Granier - Jonathan Pool - Dirk Willkommen - Robert Carnaghan - Hans Bakker - Pierre Lamaud - Ranieri Clerici - s-ro Lentaigne - Hilary Chapman - Brian R. Bishop - Eoin O. Carra - estona esperantisto.

SINCERAN DANKON.

+++++

PROJEKTO RESPEKTO

Nederlandlingva raporto kun ampleksa materialo pri interesa eksperimento (kreado de informiloj ktp. kaj studkoferenco) organizita de "Stichting voor internationale kommunikatie", Kastelenstraat 231, Amsterdam Z., Nederlando, ng 2,50 + afranko.

A. I. D. M. L. K.

Jen ni publikigas kelkajn informojn pri
la ASOCIO INTERNACIA POR LA DEFENDO DE LA MINACATAJ LINGVOJ KAJ
KULTUROJ (A.I.D.M.L.K.):

- 1) Estraro:
Prezidanto: Salvador Espriu Castelló (kontaktabla pere de la ĝenerala
sekretario)
Vicprezidantoj: Peter Gabriel, Hundeshagenstraße 22, D-53 Bonn
Eugène Goyeneche, "Uhaldea", F-64 Ustaritz
Boris Pahor, Salita Contovello 23, Barkoulje, I-34138 Trieste
Ĝenerala sekretario: Jordi Costa i Roca, 22, rue Greuze, F-66 Perpignan
Vicsekretarioj: Jean Bernert, Lycée Déodat de Séverac, F-66400 Ceret
Dr. Constantin Michael-Titus, 44, Howard Rd., Upminster,
RM14 2UF, Grandbritio
Trezoristo: Jacques Déprez, 5, rue Pierre Corneille, F-68 Saint-Louis
Teritoriaj sekretarioj:
Aŭstrio: Dr. Pavel Apovnik, Krenzbergsiedlung 51, A-9100 Völkermarkt
Francio: Armand Keravel, 6, rue Neptune, F-29 N Brest
Grandbritio: Dr. C. Michael-Titus (adreso supre)
Italio: Tavo Burat, via Firense 32, I-13051 Biela-Ciavassa
Norvegio: Lars Ullgren, N-2232 Tobøl
Svedio: Thomas Lunden, Rågången 124, S-17500 Jakobsberg
Jura konsilanto: Dr. Theodor Veiter, Schloßgraben 16, A-6800 Feldkirch
- 2) Membraro:
A.I.D.M.L.K. havas du membrokategoriojn: aliĝintajn asociojn kaj individuojn.
Nuntempe membras 26 asocioj kaj krome individuoj el 11 etnoj vivantaj en
10 eŭropaj ŝtatoj.

Se vi deziras havi detalajn informojn pri diversaj etnaj minoritatoj, turnu vin aŭ al iu el
la supre menciitaj estraranoj aŭ al la redakcio de ETNISMO, kiu klopodos peri kontak-
tojn.

ETNISMO - informilo pri etnaj problemoj. Eldonanto kaj responsa redaktoro:
Uwe Joachim Moritz, Blumenstr. 7, D - 511 Alsdorf, tel.: 02404 - 4393.

ETNISMO estas dissendata senkoste, tamen donacoj estas bonvenaj: poŝtĝirkonto
23 26 12 - 306 Hannover (por la eldonanto persone).

Ekzistas ankoraŭ kelkaj ekzempleroj de numeroj 1 kaj 2. ETNISMO aperas laŭbezone.